Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 39 - trimonata
09/1

IPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Luiza Carol
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Peter Baláž
Romano Bolognesi
Aida Čižikaitė
Renato Corsetti
François Hounsounou
Dennis Keefe
Jolanta Kieres
Etelka Kiss-Jakupović
Zsófia Kóródy
Katalin Kováts
Geraldo Mattos
Svetlana Mirošničenko
Atilio Orellana Rojas
Johano Petik
A Giridhar Rao
Thierry Salomon
Josef Schiffer
Irena Szanser
Paulo Sérgio Viana





ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: *Enkonduko*.... 3
Svetlana MIROŜNIĈENKO: *Analizo de poeziaĵoj* 4
Luiza CAROL: *Esperanto kiel pera lingvo* 6
Denis KEEFE: *Ni provas instrui bone. Ĉu ni nun provu lerni bone?* 8
Geraldo MATTOS: *Ago kaj stato ĉe participo*.... 9
Renato CORSETTI: *Luiz PORTELLA: Ilustrita Oficiala Radikaro... (rec.)* 13
Katalin KOVÁTS: *La 500-a ekzerco de la LERNILOTEKO*.... 16
A Giridhar RAO: *Esperanto festata en lingvo-foiro en Barato* 18
Irena SZANSER: *Parolgenerilo*.... 20
El landoj kaj sekcioj (BJ, BR, DE, NL, PL, RS).... 26
Reagoj (Josef SCHIFFER, Romano BOLOGNESI) 31
Johano PETIK: *Pli da pesado ĉe la uzo de simpligoj!*.... 32
Thierry SALOMON: *Ripetiĝantaj fuŝoj en la informado pri Esperanto* 34
Por via notlibro.... 38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, <atilioorellanarojas@gmail.com>.* Sekretariaj taskoj. Ekzamenoj.

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>.* E-centroj, instrukapabligado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

Titolpaĝe supre: *Siva parolas pri E-o al la telugua televidkanalo TV5 en Hajderabado (Barato); malsupre: vizitantoj de la E-budo (vd p.18).*

La nunan numeron ni sendis al la presejo 21 januaro 2009, **redaktofino por la sekva numero 15 aprilo 2009.**

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Enkonduko

Post 38-jara ekzisto la titolpaĝo de IPR iĝis multkolora. Por verki la enkondukajn vortojn, mi trarigardis mian IPR-kolekton. Dum la unuaj tri jaroj (1970-72) la revuo presiĝis en Nürnberg (Germanio), la titolpaĝo estas presita sur blanka papero, kun nigra-blua grafikaĵo en la mezo.

Poste, dum preskaŭ tri jardekoj la titolpaĝo estis blua. La presejoj en Roterdamo (1973-75) kaj en Italio (1975-85) uzis blankan prespaperon blue farbitan, la teksto estis blanka, poste FEL (Belgio) uzis bluan paperon kun nigra teksto (1986-2002).

Ekde 1986 la revuo redaktiĝas en Hungario.

La E-terglobo sur la titolpaĝo la unuan fojon aperis en la numero 1998/2, danke al Ellen DALEN. En 2003 finiĝis la „blua erao" de IPR, kaj aperis la unuaj fotoj titolpaĝe. La nunan titolpaĝon kompilis hungara grafikistino, konservante la tradiciojn de nia revuo.

En la enkonduko de IPR 2008/4 mi promesis la aperigon de pli da fakaj, metodikaj artikoloj. Hungara proverbo diras: *promeso estas sono, plenumo estas bono*. Ĝuu kaj utiligu la materialojn de niaj membroj/kolegoj en la nuna numero. Kaj ne nur uzu la materialojn, sed havu kuraĝon mem verki similajn artikolojn por nia komuna organo, IPR!

Jozefo Németh, redaktoro

Analizo de poeziaĵoj

de Svetlana MIROŜNIĈENKO (Sankt-Peterburgo, Rusio)



Havante grandan sperton en E-instruado mi volus konatigi la legantojn de la revuo kun unu el la multnombraj iloj kiel instrui la lingvon al diversaĝaj lernantoj uzante kaj evoluigante la imagpovon kaj la esprimmanieron. Dum instruado de E-o, mi ofte uzas poeziajn verkaĵojn por konatigi miajn gelernantojn kun belliteraturo originala. Ordinare oni havas malmulte da lernhoroj, sed dezirante, ke la gelernantoj scipovu doni sian opinion kaj paroli uzante sufiĉe libere leksikon, mi rekomendas labori kun poeziaĵoj. Tia laboro permesos larĝigi la vortprovizon de la gelernantoj ĉar ili interpretos la verkaĵon. Krom tio, tia laboro disvolvigas la imagkapablon, ĉar oni povas trovi ne nur unu sencon sed multajn en la poeziaĵoj. Ie mi legis ke por interpreti nur kvar strofojn de Omar ĤAJAM (1048-1131), persa poeto, oni bezonis 500 paĝojn por transdoni la sencon de tio kion li volis diri per sia malgranda verkaĵo. Do analizo de poeziaĵoj estas malfacila, sed tre utila kaj interesa instruilo.

Instruante E-on oni povas uzi multajn metodojn, por ke la lernantoj atingu la kapablon bone paroli. Unu el tiaj metodoj por interesi lernantojn mi vidas en uzado de originalaj E-verkaĵoj kaj ilia analizo. La lernantoj konatiĝas kun verkaro de E-poetoj, kiuj fariĝis jam parto de la monda kulturo: Julio BAGHY, Kolomano KALOCSAY, Raymond SCHWARTZ ktp.

La celo de tia laboro konsistas en la disvolvo de la imagpovo de la lernantoj, la larĝigo de la vortprovizo kiu fariĝas pli riĉa, donante la eblon esprimi propran opinion uzante novan leksikon aŭ malkovrante la sencon de la poeziaĵo pere de la malnova leksiko por klarigi la novan. Tio tute ne estas simpla tasko.

Estas interese labori kun plenkreskuloj kaj kun infanoj. Sed laŭ mia sperto en tiu kampo la imagpovo de infanoj kaj de plenkreskuloj ne estas la samaj. La infanoj havas imagkapablon pli riĉan, sed ilia vivsperto estas tre limigita ankoraŭ. Pro tio, por analizi poeziaĵon oni nepre devas atenti la aĝon de la studantoj kaj elekti la materialon depende de la interesoj de tiu al kiu oni instruas.

La poeziaĵo emocias leganton per vortoj, kiujn la aŭtoro uzas en sia laboraĵo. Krome la formo (ĝenro) de la poeziaĵo ankaŭ interesas nin. La dua flanko, kiu ankaŭ tre gravas, estas la lingva flanko. La komunikado realiĝas per vortoj kiuj havas sian propran sencon. Tiun ĉi sencon ni povas trovi en vortoj. Sed tre ofte la vortoj akiras novan sencon en la poeziaĵo, kiu dependas de vortoj, kiuj ĉirkaŭas ilin. Por pli facile studi iun fremdan lingvon, la leksika materialo estas organizata ordinare laŭ temoj. Ne eblas ignori la ligon inter vortoj, sed en la sama tempo oni ne devas limigi la uzadon de vortoj nur laŭ la tema principo. Tio malriĉigus la eblecon de ilia uzado por transdoni la sencon. La lernado de leksiko realiĝas en larĝeco: oni studas ĝin konatiĝante kun novaj vortoj kaj reale la lernantoj pliriĉigas sian vortprovizon. Kaj krome, oni studas la leksikon profunde: oni lernas ĝin uzante sintagmajn, paradigmajn kaj sencajn ligojn. Alproprigo de la vortprovizo okazas en reala situacio, kiam la lernantoj havas eblecon esprimi siajn proprajn pensojn pri tio, kion ili komprenis. Ĉiuj tavoloj de la analizo interagas nepre.

Por analizi poeziaĵon mi prezentas la sekvajn laboretapojn:

1. konatigi la biografion de la poeto kaj lian verkaron;
2. atentigi pri la titolo de la literaturaĵo;
3. legi la verkon;
4. traduki la verkon;
5. respondi al demandoj laŭ tekstoj, kiuj estas preparitaj antaŭe;
6. lirika heroo: tiu kies emocioj estas montritaj en la poeziaĵo; sed ne ĉiam oni povas lin identigi kun la aŭtoro;
7. trajtoj de figuroj lirikaj: lirika ĝenerala heroo, alegoriaj figuroj, simbolaj figuroj, objektoj;
8. analizo de situacioj, kiuj vekas emocion;
9. analizo de la lingva flanko de la poeziaĵo: epitetoj – artaj determinoj, komparoj – metodo de priskribo aŭ trajtoj de la naturo, de persono, de ago ĉar ili transdonas la aŭtoran rilaton al la heroo, tristecon, admiron ktp. Ili transdonas ankaŭ humoron, emocion de la heroo.
10. analizo de sintaksaj esprimiloj: paralelismoj, inversio (malrekta vortordo), preterlaso de vortoj kaj de vortogrupoj, kio transdonas animajn emociojn;
11. surbaze de poeziaĵo oni povas ellabori multajn gramatikajn ekzercojn, leksikajn ekzercojn depende de la bezonoj;
12. estas antaŭvidata laboro kun vortaroj dum lecionoj kaj hejme.

Post tia analizo oni finas per interpretado de la verkaĵo. En la leciono ĉiu diras sian propran opinion: kiamaniere li (ŝi) komprenis la poeziaĵon. Komprenado de la poeziaĵo estas malkovro por studantoj. La proceso por malkovri la sencojn estas komplika sed pasiiga. Ĝi estas plena de konoj pri la mondo kaj la homo. Eblas antaŭvidi kreajn laboraĵojn de gelernantoj ekspluatonte novan leksikon. Posedante jam bone la lingvon la gelernantoj povas konatiĝi kun frazeologio en E-o kiu estas riĉa. La laboro kun poeziaj verkoj estas malfacila, ĉar anstataŭ strofoj oni devas uzi frazojn en prozo kiam oni interpretas poeziajn verkaĵojn. Dum la lecionoj disvolviĝas la parolmaniero kaj la skribmaniero de la gelernantoj. Certe formiĝas ilia estetika koncepto, plilarĝiĝas la lega horizonto de la lernantoj. Ili volas konatiĝi kun novaj verkoj de certa poeto, disvolviĝas la pensmaniero de la gelernantoj. Do ili akiras konojn pri E-literaturaĵoj, kiuj jam estas parto de la monda kulturo.

Bibliografio:

1. Gvidlibro por supera ekzameno. Hungara E-Asocio. Budapest, 1979, p.358.
2. Doronina T.V. Analiz stiĥotvorenija. Izdatelstvo "Ekzamen", Moskva, 2006, p.190. (Analizo de poeziaĵo.)
3. Kolkova M.K. Obuĉenie inostranim jazikam. SPb.: KARO, 2003, p.320 (Instruado de fremdaj lingvoj.)
4. Tomaŝevskij B.V. Teorija literaturi. Poetika. M., 1996, p.334 (Teorio de la literaturo. Poetiko.)

Esperanto kiel pera lingvo

de Luiza CAROL (Israelo)



La rekta metodo de lingvoinstruado (la "situacia" metodo) havas multajn avantaĝojn. Ekzemple: ĝi taŭgas por internaciaj grupoj (lernantoj el multaj landoj, kun diversaj denaskaj lingvoj); ĝi kutimigas la lernanton pensi rekte per la lingvo kiun oni instruas; ĝi imitas la "naturajn" cirkonstancojn de interkomunikado; ĝi estas kutime tre agrabla por la lernantoj ktp.

Tamen, la rekta metodo povus havi ankaŭ malavantaĝojn, kiel ekzemple: multaj plenkreskuloj malpaciencas, se oni ne donas al ili minimumon da tradukaĵo; kelkfoje la

rekta metodo konfuzas la lernantojn (ekzemple: simpla esprimo kiel "Ana estas virino" povus esti komprenita ĝuste, aŭ povus esti komprenita kiel "Tiu estas virino", "Ana estas bela", "Tiu estas bela", "La virino estas bela", "Ana estas instruistino", "Tiu estas instruistino", "La virino estas instruistino", "Ana estas tie ĉi", "Tiu estas tie ĉi", "Ana estas ridetanta", "Tiu estas ridetanta", "La virino estas ridetanta" ks.)

Plej ofte la instruistoj uzas miksitan metodon: ili ja uzas la rektan metodon (uzante etajn "teatraĵojn" kiuj imitas la naturan komunikadon, uzante la manlibrojn aŭ filmojn kreitajn por la rekta metodo ks), sed ili aldonas minimumon da tradukaĵo (zorgante tamen, ke la lernantoj ne aŭskultu tro multajn vortojn en la pera lingvo, por ke ilia atento bone enfokusigu la instruatan lingvon).

Kiam oni uzas tiun miksitan metodon, la demando estas: kiun peran lingvon oni elektu? Kutime oni pensas, ke la denaska lingvo estas la plej taŭga kiel ilo de instruado. Tamen, oni povus dubi pri tio. La gramatiko de E-o estas tiom racia kaj simpla, ke ĝi povus esti pli utila ol la gramatiko de la denaska lingvo, kiam oni instruas la bazan gramatikon de ajna etna lingvo. Rilate la bazan vortaron, la genia sistemo de tabelvortoj povus esti ege utila por instrui la koncernajn ŝlosilvortojn en ajna etna lingvo. La neŭtraleco de E-o igas ĝin pli taŭga ol la angla, kiam oni uzas la manlibrojn por instrui al internaciaj grupoj. Mi proponas do, ke ni uzu E-on kiel eble pli ofte kiel peran lingvon por instrui etnajn lingvojn, en manlibroj de meminstruado, elŝuteblaj el la reto.

La kurso "Bildoj kaj demandoj" en la retprogramo "lernu!" (internacia programo por la instruado de E-o) ŝajnas al mi ege bela ekzemplo de miksita metodo. Kvankvam la tutan kurson oni organizis laŭ la rekta metodo, la lernanto ja havas la eblon vidi la tradukon de ajna vorto per simpla muspremo. (La lernanto povas ankaŭ elekti en kiun lingvon oni traduku la koncernan vorton.). Tian kurson oni povus relative facile aliformigi en bazan kurson pri ajna etna lingvo pere de E-o. Kompreneble, tiucele oni devus aldoni multajn aliajn elementojn de gramatiko kaj de vortaro, ĉar la bazaj elementoj de ajna etna lingvo estas pli multaj ol tiuj de E-o. Ankaŭ la Cseh-metodon oni povus uzi por instrui etnajn lingvojn, aŭ tiajn belajn materialojn kiel "Mazi en Gondolando" ktp. Se tia eksperimento sukcesas, ĝi per si mem pruvas la efikon de E-o kiel pera lingvo por lerni etnajn lingvojn.

ILEI-anoj!
Ni provas instrui bone. Ĉu ni nun provu lerni bone?

de Dennis KEEFE (Usono) *(aperis en e-ins 10 julio 2008)*



Sukcesaj organizaĵoj, firmaoj kaj asocioj lernas. Ili lernas de aliaj organizaĵoj, de la ĝenerala socio kaj de si mem. Unu el la plej bonaj manieroj lerni pri si mem estas koni ĝisfunde sian historian, siajn agojn kaj siajn atingojn. Sukcesaj organizaĵoj ofte listigas ĉion utilan kaj valoran el sia historio, disponigante ĝin sur la interreton por ĉiuj el siaj laborantoj kaj kunlaborantoj. Eventoj, prelegoj, statistikoj, analizoj kaj ĉiaspecaj okazaĵoj estas ofte surretigitaj por ĉies okuloj kaj por ĉies lernado. E-o ĝenerale, kaj ILEI specife povas fari simile, kreante informobazon sur kiu ni povos lerni pli vaste kaj pli profunde.

ILEI jam faris tre-tre bonan paŝon tiudirekte kiam ni metis artikolojn de IPR sur la Interreton. Se iu nun volas verki artikolon pri la instruado de E-o en Ĉinio, la verkonto povas konstati, ke Liu XIAOJUN jam faris skribaĵon tiurilate en 2004. Tamen la paŝado devas iri pli antaŭen ĉar dum multaj artikoloj el IPR nun komplete disponeblas, kelkaj pli novaj, inkluzive tiun pri instruado en Ĉinio, ankoraŭ ne aperis plentekste.

Kaj aliaj facilaj paŝoj eblas, laŭ mi. Ekzemple, ni povas enarkive listigi la prelegojn faritajn dum ILEI-Konferencoj tra la jaroj. Tiamaniere, venontaj prelegantoj povas daŭrigi la konstruadon de ideoj, kiujn aliaj esperantistoj alitempe jam komencis. Por la Tago de la Lernejo, ni povas fari similan liston. Mi memoras, ke Jozefo HORVÁTH faris elstaran prelegon dum la UK de Hungario en 1983. Bedaŭrinde, mi ne trovas ie ajn eĉ unu vorton pri tiu brila kontribuaĵo al nia instruado. Estos facile, post kiam tiaj informoj aperos, lasi ilin surrete por ĉiam, tiel kreante potencan memorlokon de Esperantaj pedagogiaj informoj kaj antaŭeniraĵoj kiuj helpos al ni lerni.

La informoj povas esti laŭbezone korektitaj, kaj aldonaj informoj povas enmetiĝi, helpante nin lerni eĉ pli. Ekzemple, Aleksandr MELNIKOV faris ege amuzan, altvaloran prezentadon de instruteknikoj ĉe la ILEI-Konferenco en Kerkrade en 1988. Tiam ne ekzistis facila maniero filmi kaj disponigi la informon al tiuj ILEI-membroj kiuj ne partoprenis en tiu

konferenco. Hodiaŭ tamen, Aleksandr mem, se li emas, povas filmiĝi rekreante sian prelegon por la ĝuo kaj lerno de ni nun en la jaro 2008.

Sciu, ke la mona kosto fari la supre-menciitajn lernigajn aldonaĵojn estas preskaŭ nulo. Do financaj postuloj ne bremsos la aplikon de la aldono de utilaj historiaj informoj. Krome, la laboro povas esti farata iom post iom, tra la jaroj se bezonate. Hodiaŭ oni scias, ke en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo estas tiuj organizaĵoj, komercaj kaj nekomercaj, kiuj plej bone lernas, kiuj pleje sukcesas. Ĉu ILEI ne estus multe pli sukcesa kaj efika, se ĝi ne nur instruus, sed ankaŭ mem lernus?

Kaj vi, kara leganto, ĉu vi lernis iom el ĉi tiu interreta mesaĝo? Kion vi pensas pri ĉio ĉi? Ĉu utila, ĉu eble ne sufiĉe praktika? Kion vi mem povas fari por realigi ĝin, se vi pensas, ke ĝi bonas?

Ago kaj stato ĉe participo

de Geraldo MATTOS (Brazilo)

Dum sia historio, la *Akademio de Esperanto (AdE)* trifoje traktis pri pasivaj participoj kaj voĉdonis pri ili:

1.) Cirkulero 79-a de la 27-a de julio 1965, en kiu estas konfirmata la aprobo de tio, ke la *Fundamento de Esperanto (FdE)* havas klaran instruon pri la uzo de la participoj: 24 aproboj el 33 voĉdonantoj.

2.) Cirkulero 84-a de la 10-a de novembro 1966, en kiu ne estas konfirmata la aprobo de la rezolucio pri la uzo de la participoj pro unu sola mankanta voĉo, ĉar estus necesa pli ol duono de la 43 tiamaj akademianoj: 21 aproboj el 24 voĉdonoj.

3.) Cirkulero 91-a de la 23-a de novembro 1967, en kiu estas konfirmata la senco de kvar testofrazoj, en kiuj aperas estantaj kaj estintaj pasivaj participoj: 26 el 37 voĉdonintoj, nome pli ol duono de la akademianoj, opinias, ke la esprimo „esti -ata" neniam povas indiki finitan okazaĵon.

Ege lamentinde tamen estas, ke neniaj reguloj estis donitaj de la *AdE* por la bona uzo de la participoj. La tria voĉdono estas plene senutila, ĉar ĝi nur interpretas kvar frazojn, kiujn ĉiuj lingvouzantoj devos mem interpreti por konstati, ĉu ili kongruas kun ĉiuj frazoj de la *FdE* kaj la lingvouzo de *Zamenhof*. Krome, el la kvar frazoj kun pasivaj participoj du prezentas ilin estantaj kaj du ilin estintaj, sed ĝis nun estas multaj eraroj ankaŭ koncerne la aktivajn participojn...

Multe pli grava estas la fakto, ke unu el la kvar testofrazoj prezentas eraran interpreton, ĉar ĝi aperas ekster sia kunteksto:

2 – „*Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de majo*.”

= A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de majo.

La fuŝon tamen mia afabla geleganto konscios post la sekvantaj klarigoj. Se ni komparas la simplajn verboformojn kaj la kompleksajn, estigitajn per la kopulo, ni alvenas al la sekvantaj konkludoj pri iliaj sencoj kaj interrilatoj:

Aktivo	**Pasivo**	**Ekzemploj aktivaj: agoj**	**Ekzemploj pasivaj: agoj**
lavas	estas lavata	li lavas bebon	bebo estas lavata
lavis	estis lavata	li lavis bebon, kiam mi eniris	bebo estis lavata de li, kiam mi eniris
lavis	estis lavita	li lavis bebon kaj nun lin vestas	bebo estis lavita de li kaj nun vestata
lavos	estos lavata	li lavos bebon	bebo estos lavata de li
lavus	estus lavata	li lavus bebon	bebo estus lavata
lavu	estu lavata	li lavu bebon	bebo estu lavata de li
lavi	esti lavata	lavi bebon estas necese	esti lavata estas necese al bebo

El la supraj informoj evidentiĝas, ke la estinta verboformo estas unusenca pri tio, ke ĝi indikas pasintan fakton koncerne la momenton de la parolo, sed dusenca pri la tempo de la ago: nur la kunteksto decidas, ĉu temas pri okazanta aŭ okazinta fakto en tiu pasinteco... Bonan ekzemplon donas al ni la *Ekzercaro de la FdE* (17:8), en kiu la verboformo *parolis* egalas al la esprimo *estis parolanta* [malsupre, miaj grasaj literoj]:

[...] *dum ŝi **parolis**, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.*

Alia ekzemplo de la sama *FdE* (15:3) permesas al ni revidi, ke la rilato inter pasinta verboformo kaj participo estas duobla, ĉar al tiu sama verboformo respondas jen estinta, jen estanta participo [miaj grasaj literoj]:

*Kaj ŝi tuj **lavis** sian kruĉon kaj **ĉerpis** akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam **subtenante** la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune.*

La transformo pruvas miajn vortojn kaj kondamnas la kurantan ideon, ke participoj egalas al adjektiva subpropozicio, origino de la abundaj eraraj elektoj de participoj, kiuj neniam estas verboformoj, sed substantivoj, adjektivoj aŭ adverboj:

*Kaj tuj **lavinte** sian kruĉon kaj **ĉerpinte** akvon en la plej pura loko de la fonto, ŝi alportis al la virino kaj ĉiam **subtenis** la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune*.

Ni do konkludas pri la dusenceco de la is-vorto: la formoj *lavis* kaj *ĉerpis* respondas al la formoj *lavinte* kaj *ĉerpinte*, ĉar ili indikas okazintajn agojn en la pasinteco, dum la formo *subtenante* respondas al la sama is-formo, kiu nun indikas okazantan agon en la pasinteco.

La E-aj pasivaj participoj ne estas simetriaj al la koncernaj verboformoj, ĉar ili prezentas neuzatajn aŭ dusencajn esprimojn depende de la semantika tipo de la verbo.

Statoverboj estas tiuj, kies halto kaj fino produktas la saman senestecon per ordinara neplueco, kaj estas karakterizataj de la neuzo de la estinta participo kaj de la malofta uzo de la estonta. La neuzo de la estintaj participoj devenas de simpla bonedukiteco, ĉar estas pli delikate paroli pri la fino de stato ol pri la daŭro de la koncerna statomanko, nome pli bone estas nei fakton ol jesi ĝian foreston:

Statoj: -ata	**Statoj: -ita**	**Statoj: -ota**
estas amata	estas amita [ne plu estas amata]	estas amota [estas estonta amata]
estis amata	estis amita [ne plu estis amata]	estis amota [estis estonta amata]
estos amata	estos amita [ne plu estos amata]	estos amota [estos estonta amata]
estus amata	estus amita [ne plu estus amata]	estus amota [estus estonta amata]
estu amata	estu amita [ne plu estu amata]	estu amota [estu estonta amata]
esti amata	esti amita [ne plu esti amata]	esti amota [esti estonta amata]

Netransiraj statoverboj kondutas egale, sed sen pasivo: *dormi* kaj *sidi*, kies estintajn participojn neniu uzas: *dorminta* estas ne plu dormanta kaj *sidinta* estas ne plu sidanta....

Agoverboj estas tiuj, kies halto kaj fino produktas apartajn rezultojn, ĉar la halto simple interrompas la agon, dum la fino ĝin kompletigas. La dissimetrio estas ege frapa:

Ago: -ata	**Agoj: -ita**	**Statoj: -ita**	**Agoj: -ota**
estas lavata		estas lavita	estas lavota [estas estonta lavata]
estis lavata	estis lavita	estis lavita	estis lavota [estis estonta lavata]
estos lavata		estos lavita	estos lavota [estos estonta lavata]
estus lavata		estus lavita	estus lavota [estus estonta lavata]
estu lavata		estu lavita	estu lavota [estu estonta lavata]
esti lavata		esti lavita	esti lavota [esti estonta lavata]

Lamentinda nescio de multaj estas tio, ke indikas agon nur unu el la kombinoj de la kopulo kun estinta participo [supre: *estis lavita*], dum ĉiuj aliaj ses kombinoj indikas nur sole staton!...

Adverbaj esprimoj pri tempo kaj daŭro permesas facile distingi inter la du malegalaj sencoj de la tempodependa ago kaj de la daŭrodependa stato ĉe la estintaj participoj de agoverboj:

Li estis lavita antaŭ du horoj [ago en tempo: li fariĝis lavita antaŭ du horoj].

Li estis lavita de du horoj [stato en daŭro: li troviĝis lavita de du horoj].

Se la supraj konsideroj estas ĝustaj, la 2-a testofrazo de la venkinta propono de la *AdE* pruvis nenion krom demonstri, ke neniu el la voĉdonantoj vere mastris la sencon de la participoj:

2 - *Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de majo*.

= A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de majo;
B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de majo.

La saman rezulton havus la responda aktiva formo de tiu testofrazo:

Mi promesas, ke mian ŝuldon mi estos paginta la 9-an de majo.

La vorto *kvita* estas sinonimo kaj de la aktiva participo *paginta* kaj de la pasiva *pagita*: paginta homo estas kvita homo kaj pagita ŝuldo estas kvita ŝuldo...

En tiuj du okazoj de aktiva kaj pasiva frazoj la pago povus esti antaŭa sen la falsado de la farita promeso, nome unu aŭ du tagojn antaŭe: en la 9-a de majo estos pagita ŝuldo kaj paginta homo. La senco A postulus alian participon, nome la estantan, kiu prezentus agon, dum la estinta indikas nur la rezulton de ago, kiun ajn daton ĝi proponus por la stateco:

Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagata la 9-an de majo.

Neniu el la respondoj estas do valida: plej malfrue li povus pagi je la unua sekundo de la 9-a de majo... La sola ĝusta interpreto de tiu frazo estas la sekvanta: en la 9-a de majo estos paginta homo kaj pagita ŝuldo... Tio tamen indikas nenion pri la momento de la pago, sed nur la unuan tagon de la kviteco!

Konklude, mi ĉiam trovis strange kaj skandale, ke ŝajne neniu esperantologo aŭ gramatikisto rekonis, ke tio estas nur la parolo, kiu difinas la epokon de la verboformoj estanta [dum la parolo: dirante, ke mi lavas], estinta [antaŭ la parolo: dirante, ke mi lavis] kaj estonta [post la parolo: dirante, ke mi lavos], dum tio estas nur la propra fakto [jen ago, jen stato,

jen proceso], kiu difinas la epokon de la participoj estanta [dum la fakto, nome dum la lavo: lavanta homo kaj lavata vesto], estinta [post la fakto, nome post la lavo: lavinta homo kaj lavita vesto] kaj estonta [antaŭ la fakto, nome antaŭ la lavo: lavonta homo kaj lavota vesto]. En gramatikaj terminoj, la epoko de la parolo estas tempo, kaj la epoko de la fakto estas aspekto.

Tiaj eraroj venas de centjara instruo pri la participoj, komence de *L. de BEAUFRONT* (Commentaire sur la Grammaire Esperanto, p. 47. Paris: Hachette, 1904. 156 p.):

Ce livre sera imprimé à Paris. Tiu libro estos presita en Parizo.

Se la libro estos presata en Bulonjo-sur-Maro kaj la eldonejo ĝin portos al Parizo, evidente ĝi estos presita en Parizo... La franca frazo parolas pri presota libro, sed la esprimo *estos presita* indikas rezulton de ago, kaj tie devus do aperi la esprimo *estos presata*, kiu estas mem ago... Stulta nescio, ke la franca *imprimé* estas dusenca: jen *presata*, jen *presita*!

Por fina konsolo, fuŝelektita participo neniam estigas gramatikan eraron, sed nur semantikan paradokson, kiel la sekvanta: *La partoprenintoj voĉdonis kun la Prezidanto...*

Kaj lasta konsterno: la *AdE* mortigis la estantajn participojn aktivan kaj pasivan, kiujn nur kelkaj miraklantoj revivigas...

Luiz PORTELLA: Ilustrita Oficiala Radikaro Esperanta por Lernanto. Braziljo: Eldonejo Pentuvio, 2008 (rec.)

„*Nulla sit radix, a qua non et Nomina ed Adnomina, et Verba et Adverbia formentur: eritque Lingua facundissima, ad omnia exprimendum sufficientissima, simulque facillima utpote perpetuo analoga…*”.

En E-o tio estas: „Ne estu radiko, el kiu oni ne povas formi substantivojn (o-vortojn, se vi preferas tiun terminaron), adjektivojn, verbojn kaj adverbojn. Ĝi estos tre riĉa lingvo, tre sufiĉa por esprimi ĉion kaj samtempe tre facila ĉar absolute regula…”. Ne temas pri Zamenhof en la Fundamento sed pri Komenio en *Novae Harmonicae Linguae Tentamen Primum* (Unua Skizo pri la Nova Harmonia Lingvo).

Tio ne malgrandigu la meritojn de Zamenhof, sed grandigu la riĉecon de E-o, kiu estas lingvo tre produkto-kapabla. El unu radiko per la

R

rabato malaltigo de prezo[9]
rabi (*tr*) per forto aŭ minaco (uzi forton) forpreni ies posedaĵon[8]
racio kapablo decidi per logika rezonado[9]
radiatoro aparato ĉe motoro, kie varmega akvo malvarmiĝas por plu helpi teni temperaturon de motoro[9]
radiko subtera parto de arbo aŭ alia kreskaĵo[7]



radio• ĉiu aparta rektlinia elsendaĵo el fonto de lumo, varmo, elektro ktp[5]
rado• ronda aĵo turniĝanta ĉirkaŭ centra akso[6]



rafano manĝebla radiko de herbo (*Raphanus*)[9]



rajdi (*x*) iri sidante sur dorso de besto[7] b•



rajto• povo fari ion aŭ postuli ion de aliuloj[3]
rakonti• (*tr*) parole aŭ skribe konigi okazintaĵon[3]

uzo de sufiksoj kaj per vorto-kombinado oni povas fari miraklojn. Pro tio oni bezonas lerni malpli da radikoj ol oni bezonas lerni en naciaj lingvoj. Ankaŭ pro tio E-o estas pli facile lernebla. La ĉefa lernofaciliga faktoro, laŭ mi, ne estas, tamen, ĉi tiu, sed la absoluta reguleco, la facileco de la gramatikaj reguloj (almenaŭ supraĵe) kaj la manko de malsimplaj konjugaciaj formoj de la verboj.

Se ni revenas al la radikoj, ni trovas, ke en la pasinta jarcento oni pli kaj pli donis atenton al la vortostoko en la verkado de lernolibroj en naciaj lingvoj. La laboro de la Akademio de E-o, kiu starigis la Bazan Radikaron Oficialan (BRO), estis laboro en la ĝusta direkto. Ĝi volis esence montri al la verkistoj, kion oni renkontas pli ofte en E-o. Post tiu esploro venis aliaj esploroj, sed ĝi restas tre facile alirebla mejloŝtono. Ĝi aperis en la Aktoj de la Akademio II 1968-1974, kaj ĝi estas havebla ĉe ĉiuj libroservoj kaj ankaŭ rete de la Libroservo de UEA. Post ĝia apero multaj komencis atenti ĝin, kvankam la sistema aplikado al nove eldonataj lernolibroj ankoraŭ nun ne ŝajnas al mi ĝenerala.

Sur tio, kion mi ĵus diris, baziĝas mia pozitiva pritakso de la laboro de *Luiz PORTELLA*. Li mem estas same konvinkita kiel ĉiuj aliaj „skemismaj" predikantoj, inkluzive de mi, ke „kelkaj homoj emas aldoni la finaĵon -o al vortoj de siaj gepatraj lingvoj. Sed tio igas E-on nekomprenebla al homoj de aliaj landoj." Tio estas la unua frazo en lia enkonduko.

Li, do, opinias, ke „koni la Fundamenton de E-o kaj la BRO-n estas devo de ĉiu bona esperantisto." Sekve, li prenis la vortojn de la BRO kaj konstruis malgrandan vortareton por la lernantoj, kiuj povas lerni tiujn vortojn pere de la difinoj en E-o kaj pere de multenombraj malgrandaj

desegnaĵoj (proksimume 500 en la tuta libro). Fakte estas malfacile bildigi al si ĝirafon, se oni neniam vidis ĝirafon, nur surbaze de la difino: „altega besto kun longaj kruroj kaj kolo”. La alia avantaĝo de la vortareto estas la fizika malgrandeco, vere poŝa (10,5x15 cm-oj), kaj sekve la malalta kosto, fakte 7,20 brazilaj dolaroj (iom malpli ol 3 eŭroj), al kiuj aldoniĝas la sendokostoj.

La difinoj estas faritaj per vortoj, kiuj mem apartenas al la priparolata vorto-stoko, kio estas bona principo, ĉar ĝi permesas al komencantaj lernantoj ne bezoni alian fonton por klarigoj. Alia bona, laŭ mi, sed certe kritikota de aliaj, decido estas la prefero de la formoj kun „ĥ”. Ekzemple „kemio” resendas al „ĥemio”. La difinoj, tamen, estas iom pli koncizaj ol tiuj de la Baza Esperanta Radikaro de *Wouter F. PILGER*. Aliflanke ĝi donas indikojn pri transitiveco kaj netransitiveco de verbaj radikoj, kaj tio estas utila por multaj komencantoj.

La redaktinto ne haltis ĉe la BRO. Pri unu serio, la vortoj de la 9-a Oficiala Aldono, kiu venis post la BRO, nenio estas dirinda. La decido fari tion estas konsekvenca. Ili ne povis esti en la BRO pro tempaj kialoj. Oni povas sin demandi, ĉu ili estus en unu el la naŭ ofteco-grupoj, sed la demando ŝajnas al mi respondebla preskaŭ ĉiam pozitive.

Estas alia serio, bonŝance tre malgranda, kiu estas vortoj taksataj necesaj kaj do indaj je ĉeesto en ĉi tiu vortareto. Foliumante iom atente mi ne povis trovi multajn, sed la du kiujn mi trovis, estus ambaŭ prefere restintaj ekster la vortareto. Unu estas „gambo”, vorto, kiu nun batalas por forigi la vorton „kruro”. Laŭ mi, malgraŭ la asertoj, ke oni devas distingi partojn de la kruro, temas nur pri plia latinid-devena radiko. La dua vorto en ĉi tiu kategorio estas zoo (= bestoĝardeno). Mi ankoraŭ kredas, ke la tradicia „bestoĝardeno” estas pli bona ol „zoo” aŭ „zoologia ĝardeno”.

Entute la verko estas eta laŭ la fizika grandeco sed ne laŭ la signifo, kiun ĝi povus havi en la movado. *Luiz PORTELLA*[1], cetere, tre aktive puŝas la verkon sub la devizo: „Ni donu unu vortaron al ĉiu lernanto”. Kiom mi scias, li mem provas alvenigi centojn al afrikaj esperantistoj.

Renato CORSETTI

[1] Retadreso: lfpor@lujz.org

La 500-a ekzerco de la LERNILOTEKO

Gramatika ekzerco de Katalin KOVÁTS (HU/NL) el *www.edukado.net.*
(Nivelo: ekde B1)

Tasko: *Bonvolu kompletigi la tekston uzante la taŭgan formon de unu el la listigitaj radikoj. Kelkfoje eblas pluraj solvoj.*

dev-, pov-, ebl-, neces-, bezon-, rajt-, sci-, kapabl-,

Ĉu vi _____ ke la LERNILOTEKO estas la plej vizitata parto de nia retejo? Tie oni _____ elŝuti ekzerco-materialojn, pretajn je tuja dumkursa uzo. Tiu nuna estas la 500-a jubilea ekzerco de la sekcio.
La ĝisnunajn materialojn ekde la jaro 2005 oni elŝutis jam pli ol 80 mil fojojn. Inter la elŝutintoj _____ trovi kelkajn elstarajn rekordulojn, kiel L.P. el Francio kun 1260, H.F. el Hungario kun 1085 kaj G.D. el Greklando kun 942 elŝutoj. La plenajn nomojn de ili mi ne _____ publikigi, sed tiujn vi eĉ ne _____ _____. Gravas nur, ke estas vera intereso pri la ekzercoj, kaj tial ili meritas iom da popularigo.
Kiam iu sendas ekzercomaterialon al la redakcio, ĝi _____ esti kontrolata kaj ankaŭ aspekte rearanĝata, por ke ĝi konformu al la aliaj ekzercoj de la kolekto. Ofte _____ tuŝi la tekstojn, modifi ilin, sed eĉ tiel ni ĉiam tre ĝojas ricevi novajn temojn kaj ideojn.

Semajne ni klopodas aperigi 1-2 novajn ekzercojn. Oni _____ mendi mesaĝan averton pri la novaj eroj kaj tiel oni ne _____ daŭre traserĉi la liston, ĉar oni _____ esti informitaj pri la aktualaĵoj.
Post la ricevo de la mesaĝo _____, ke oni iru al la paĝaro mem. Tion oni _____ fari klakante al la ligo en la mesaĝo (ĉe HTML-mesaĝoj) aŭ oni _____ serĉi la koncernan titolon en la listo ĉe la LERNILOTEKO.
Ofte okazas, ke kolegoj antaŭ kursoj _____ certan materialon. La diversaj serĉfunkcioj _____ rapide trovi la necesajn foliojn. Oni _____ elekti diversajn serĉ-opciojn por malgrandigi la liston de taŭgaj ekzercoj. Oni simple _____ indiki kelkajn el la sekvaj kriterioj: kategorio, nivelo, ekzercotipo, lingvo; aŭ oni _____ doni ankaŭ konkretajn ŝlosilvortojn, temojn – kaj jen tuj _____ konsulti la liston de la taŭgaj ekzercoj.
Elektinte unu el la listo unue _____ vidi nur la priskribon de la ekzerco, sed ĝin mem _____ elŝuti nur registritaj membroj. Ankaŭ al la membroj

_____ unue ensaluti por _____ plene uzi la servojn de la paĝaro. Se oni estas membro sed ne ensalutas, oni ne _____ elŝuti la ekzercojn.
Niaj materialoj estas plej ofte en PDF-formato. Por tio la uzantoj _____ havi specialan programon, ekzemple AcrobatReader. Ĝin oni _____ elŝuti senpage. Ni konsilas ĉiam unue legi la priskribon por _____ pri kio temas la materialo. Ne _____, sed vi _____ sekvi la retligojn ene de tiuj priskriboj por havi eĉ pli larĝajn informojn pri la rilataj aliaj materialoj. Post tio fine vi _____ elŝuti la ekzercon. Vi _____ elekti el du manieroj: aŭ nur rigardi ĝin aŭ tuj konservi la dokumenton en vian komputilon kaj tiel al vi _____ poste kiam ajn rerigardi ĝin. Multaj eĉ tuj printas la foliojn kaj bele aranĝas ilin laŭ diversaj sistemoj. Ĉi-sube _____ vidi ekzemplon de modela aranĝo de niaj materialoj. Ĉu vi _____ esti tiel ordema kaj preciza?



Elprintitaj ekzercoj de edukado.net el la kolekto de Pierre LEMARCHAND (FR)

Kiu ajn membro senpage _____ elŝuti kaj uzi niajn materialojn. Estas nur unu grava kondiĉo, kiun oni _____ respekti. Okaze de plua uzo, eventuale ankaŭ publikigo, oni _____ indiki la fonton. Ni petas, ke oni ne tuŝu la paĝaranĝon kaj lasu en la kapo- kaj piedpartoj la logotipon, aŭtoron kaj la fontindikojn.
Kiom oni _____ pagi por la servoj de edukado.net? Mone neniom, ĉar _____ elŝuti la materialojn senpage. Sed se vi konscias pri ilia utilo, se vi _____ imagi la grandan fonan laboron de tuta komunumo kaj se vi sentas la moralan _____ iel esprimi vian dankemon, vi _____ agi laŭ tri manieroj. Vi _____ kunlabori kaj sendi viajn proprajn materialojn por

publikigo kaj tiel ankaŭ vi _____ listiĝi inter la kontribuintoj. Se vi ne _____ krei valorajn materialojn aŭ ne _____ ilin dividi kun ni, vi _____ finance kontribui al la laboro de tiuj, kiuj tion faras. Bedaŭrinde la funkciigo de la paĝaro _____ ankaŭ financajn rimedojn. Se vi ankaŭ finance ne _____ helpi, ni invitas vin almenaŭ lasi vian opinion aŭ rimarkigon pri la lerniloj kaj nia laboro. Tion _____ fari aŭ sub la ekzerco mem aŭ en la Gastlibro de la paĝaro. Opinioj, kuraĝigaj vortoj ĉiam donas novan impulson al la teamo por plia kreado. Momente troviĝas 1204 opinioj sub la ekzercoj kaj la averaĝa taksovaloro estas 4,7 el 5 steloj.

Bonan kaj sukcesan uzon de NIAJ komunaj ekzercoj deziras al vi en la nomo de la teamo:

Katalin KOVÁTS, redaktoro

Solvoj: sciis, povas, eblas, rajtas, bezonas, scii, devas (bezonas), necesas, povas, bezonas, povas, necesas, povas, devas, bezonas, ebligas, povas, devas, povas, eblas, eblas, rajtas (povas), necesas, povi, povas, devas, povas, scii, necesas (estas bezonate), povas, povas, povas, eblas, eblas, kapablas (povas), rajtas (povas), devas, devas, devas, eblas, kapablas (povas), bezonon, povas, povas, povas, kapablas, volas, povas, bezonas (necesigas), povas, eblas.

Noto: La ekzerco aperis en aprilo 2008. Nun, en januaro 2009, la paĝaro havas 1800 membrojn, en la Lerniloteko estas 535 ekzercoj, elŝutitaj 98900-fojojn. La du plej diligentaj uzantoj estas P. L. V. el Francio kun 1497, kaj F. H. el Hungario kun 1144 elŝutoj. La plej populara ekzerco estas elŝutita 1014-fojojn.

Esperanto festata en lingvo-foiro en Barato

de A Giridhar RAO (Barato), *agiridhar.rao@gmail.com*

Centoj da studentoj, instruistoj kaj anoj de la ĝenerala publiko vizitis la E-budon dum la Eŭropa lingvo-foiro kiu okazis la 20an de oktobro 2008 en Hajderabado, Barato. La plejmulto el ili miris, ke io tia ekzistas; aliaj, ke ĝi viglas! Pli ol 30 montris konkretan intereson lerni la lingvon – ili lasis siajn retpoŝtadresojn kaj petis, ke ni kontaktu ilin kiam komenciĝos novaj kursoj.



Jama rezulto de la foiro estis, ke oni invitis nin paroli pri E-o en lokaj lernejoj. La 25-an de oktobro, amiko Siva kaj mi faris unuhoran prezentadon de Esperanto por ĉ. 50 gelernejanoj de privata lernejo kies instrulingvo estas la angla. Ili ĝuis la facilecon de vortfarado en E-o kaj bone komprenis la malfacilaĵojn de la angla. Kaj uzante ekzemplojn de lingva diskriminacio en nuntempa Barato (inter tiuj 50 jam troviĝis 15 lingvoj!), ni provis montri la plijustecon de E-o.

La partoprenantaj institutoj kaj organizaĵoj de la lingvo-foiro inkluzivis la francan kulturcentron *Alliance Française*, la germanan kulturcentron *Goethe Zentrum*, lokan universitaton *Osmania* kaj *UEA*-n. Oni prezentis ok lingvojn: E-on, la anglan, francan, germanan, hispanan, italan, kroatan kaj la rusan. Krom la itala (kiu havis nur unu parolantinon), ĉiu lingvo havis sian propran budon. En la E-budo deĵoris mi kaj du el miaj lernantoj, s-roj Naga SIVA KOTHA kaj Nagesh MIRTHIPATI. Nur Siva kaj Nagesh povis veni – la aliaj devis iri laborejen; ja temis pri lundo.

En nia budo ni ekspozicietis plurajn librojn kaj revuojn de Esperantujo – anglajn, Esperantajn, eĉ sanskritajn; vortarojn, lernolibrojn, romanojn, bildostriojn, porinfanajn libretojn. Ni ankaŭ surtabuligis ok afiŝojn kiujn mi elŝutis de la retejo de la usona organizaĵo *Esperanto-USA.org*. Unu montris la kontraston inter la kompleksa konjugacio en la franca kaj la ege simpla de E-o. Alia montris tekston en E-o pri la facileco de la lingvo; multaj vizitantoj ĝin bone komprenis. Kaj tria afiŝo instruis pri "Kiel mendi bieron en 26 lingvoj" – eble la plej populara afiŝo de la tuta foiro!

Ĉiu lingvo-grupo poste faris surpodie pli-malpli 15-minutan prezenton anglalingvan. En tiu tempo, mi surekranigis lumbildojn, kiuj fulme montris la vortfaradan strategion de E-o; Zamenhofon; nomojn de kelkaj aliaj planlingvoj; la viglan vivon de la E-komunumo indikita per nombro de parolantoj, eldonado, interreta aktivado – ĉefe la Esperanta Vikipedio kaj *lernu.net* – kaj la Aziajn kaj Universalajn Kongresojn. Ankaŭ menciita estis la lernofaciliga efiko de E-o. Ĉar E-o estis la plej malgranda lingvo prezentita, mi ankaŭ tuŝis la temojn de lingvoj de malplimultoj kaj malaperintaj lingvoj en Eŭropo kaj la mondo, kaj parolis pri lingva demokratio kaj la raporto Grin pri la kostoj al la Eŭropa Unio de nur-angla politiko. Mi finis per esperantigo de soneto de Ŝekspiro.

Dum la venontaj kelkaj monatoj, tiuj ĉi institutoj planas plurajn Lingvajn Tagojn por prezenti pli profunde diversajn lingvojn kaj kulturojn. La E-Tagon ni havos la 13an de decembro. Espereble, tiam kun pli da homforto, ni sukcesos munti pli ampleksan lingvoprezenton.

Fone menciindas, ke la ideo de la foiro evoluis de neformala babilado inter mi kaj s-ino Amita DESAI [*desaj*], la direktorino de la loka germana kulturcentro, Goethe Zentrum. Ni parolis pri la Eŭropa tago de lingvoj (la 26a de septembro), kaj la ŝanco kiun ĝi donas por kune reliefigi la plurajn eŭropajn lingvojn kiujn oni instruas en Hajderabado. Ŝi entuziasmiĝis, kaj enplektis la lokan francan kulturcentron, *Alliance Française*, kaj la Universitaton *Osmania*.

Kune ni kunvenis ĉe la Universitato por la angla kaj fremdaj lingvoj (angle: *English and Foreign Languages University, EFLU*). La rektoro, prof. Abhai MAURYA [abhej maŭrja] – mem profesoro pri la rusa – montriĝis ege bonvenigema al la ideo. Kiel li poste deklaris en gazetara komuniko: „La aranĝo estas la unua de sia tipo, kaj reliefigos la riĉan diversecon de lingvoj en Eŭropo.” Li aldonis, „La evento havas aldonan signifon en la jaro 2008, kiun Unuiĝintaj Nacioj proklamis „Internacia jaro de lingvoj”. Rezulte de tia kunlaboro okazis la sukcesa Eŭropa lingvo-foiro en Hajderabado.

Parolgenerilo

de Irena SZANSER (Pollando)

La Parolgenerilo estas sinteza rimedo en la formo de diagramo. La ideo de parolgenerilo estas semantika. La Parolgenerilo prezentas la lingvan strukturon en konciza formo, sen uzo de multaj gramatikaj terminoj. Ĝi provas komprenigi la semantiko-gramatikan sistemon de E-o, eble ankaŭ de aliaj lingvoj, internigi ĝin en la menso de lernanto. La internigitaj reguloj estas produktivaj.

La Parolgenerilo ne bezonas specialan apartan klarigon por lingva instruisto. Por instruisto, kiu instruas E-on al alilingvanoj, ankaŭ estos konataj la Esperantaj terminoj en iliaj gepatraj lingvoj. Mi ne ŝanĝis la Zamenhofan gramatikan sistemon. Mi nur prezentas ĝin en alia formo.

Mia konsilo estas komenci la paroligon kiel eble plej frue, uzante ne tro multe da leksemoj (sed la plej oftaj). La unua sukceso en parolkompetenteco ne dependas de la nombro de konataj leksemoj.

La Parolgenerilo prezentas la ĉefajn semantikajn kaj strukturajn interrilatojn necesajn al kreado de frazoj, esprimoj tute novaj, nekonataj antaŭe. La homo pensas, planas, starigas demandojn al si, respondas kaj decidas. Per demandoj kaj respondoj oni enpenetras en siajn pensojn kaj en la lingvan sistemon. Por paroli oni bezonas vortojn sed precipe scion kaj eĉ senton kiel ligi vortojn senerare, laŭ gramatikaj paradigmoj, kaj kun la senco, komprenebla al aliaj homoj. Pli facile estas deĉifri la sencon de la parolo ol "enĉifrigi" (enkodigi) penson en esprimon.

L.L. Zamenhof kreis bazan demandaron, kiu estas tradukita en aliajn lingvojn (vidu lernolibrojn de E-o por diverslingvanoj) kaj ĝi estas universala por la homa pensado. La instruo de prefiksoj, sufiksoj kaj de vortfarado rilatas al la strukturo de vortoj (leksika sistemo), sed ne rekte al la frazstrukturo. Tion oni instruu aparte.

La Parolgenerilo donas bazajn indikojn kaj manierojn de parolkreado, internigon de gramatiko. PAG (*Plena Analiza Gramatiko*) estas bona, sed tro multpaĝa por lernanto. La gramatiko en lernolibroj estas ege disĵetita tra la libroj.

Kelkaj informoj pri la konstruo de la Parolgenerilo:

La verbo. La Parolgenerilo havas formon de orbita diagramo kun la centra pozicio por la verbo (en E-o *-as, -is, -os, -us, -u* (kun gravaj *-ig-* kaj *-iĝ-*).) Verbo kiel kerno, nukleo de parolo kaj predikato havas decidan funkcion en la propozicio (pensunuo) en kreo de esprimo. La verbo malfermas poziciojn al taŭgaj por ĝi partneroj, aktantoj[2]. La verbo decidas pri la nombro kaj iliaj funkcioj en la pensunuo (esprimo), ligas ĉiujn elementojn laŭ semantikaj rilatoj.

La demandaro. La orbito (5) enhavas demandojn (kaj tabelvortojn). La demandoj servas kiel ŝlosiloj. Ne ĉiu demando el orbito (5) taŭgas por ĉiu verbo kaj por ĉiu elektita verbo. Tio dependas de la verba senco. Demandojn starigas lernanto(j) aŭ instruisto, en la formo de dialogo aŭ intervjuo.

Demandoj:

– *kia?* – rilatas al ecoj de la vorto kiu rolas kiel subjekto aŭ objekto, ekz.: *bela knabino, la sinjoro kun la longa barbo, libro pri historio*

[daŭrigo sur p. 24.]

[2] agrilataj frazeroj – NdlR

En la reta varianto vidu la diagramon post la lasta kovrilpaĝo!

– *kiel?* – rilatas nur al la verbo, esprimas la kvaliton de la ago, ekz.: *iu kantas bele, parolas klare kaj interese, veturas komforte*
– *pri kio?* – povas rilati al la subjekto, objekto; ekz.: *prelego pri literaturo* sed povas rilati ankaŭ al la verbo, ekz.: *mi interesiĝas pri historio…*

La subjekto. Sur la orbito n-ro 1 estas loko por la subjekto de la frazo, sendepende de la funkcio – aganto – ne-aganto. Al la pozicio de la subjekto de la frazo estas substitueblaj: *X, Y, -o, mi…, -a, unu, -anto, -i,* t.n. tagmemo[3] de la subjekto.

Deklinaciaj finaĵoj. Sur aparta orbito (2) troviĝas *-n* finaĵo por la rektaj objektoj de transitiva verbo. Por ĝi funkcias la demando *kiun?, kion?* La orbito 2 povas servi ĝenerale al deklinaciaj finaĵoj de alia lingvo.

Aliaj finaĵoj. Sur la orbito (3) estas la finaĵoj *-e, (-n)*. La finaĵo *-e* estas uzata por respondi al demando: *kiel? (bele, komforte ks.)*. Finaĵo *(-n)*, speciale metita de mi en parentezon, por ne miksi kun la -n finaĵo de rekta objekto (akuzativo). Mi ne nomas ĝin „akuzativo". Tiu *(-n)* finaĵo uzeblas por eventuala anstataŭo de prepozicio en kelkaj semantikaj sektoroj de la diagramo: *kiam?, kioman?, kien?, kiom?*

Prepozicioj. La orbito (4) portas prepoziciojn. Instruisto veku specialan „senton" pri iliaj sencoj kaj uzoj, rilate al la verba senco. La verbo indikas elekton de prepozicioj taŭgaj por la situacio kaj la intenco de parolanto. Prepozicio ludas gravan rolon en la konstruo de la frazo (esprimo). E-o postulas la logikan uzon de prepozicioj. Specialan atenton postulas la lerno de „lokaj" prepozicioj: *kie?* kaj de „movaj" prepozicioj: *kien?* Ili estas facilaj, sed precipe *„sur", „sub"* elvokas erarojn. Ankaŭ la uzo de prepozicioj en aliaj lingvoj bezonas apartan atenton. Logika uzo de prepozicioj devus ŝirmi lernanton kontraŭ oftaj eraroj, sed pro interlingva interfero, ne okazas tio facile.

En kelkaj semantikaj demandaj sektoroj (zonoj) ni vidas, ke situas kelkaj prepozicioj, ekzemple: *kie?, kien?, kiam?* En aliaj sektoroj estas nur unu prepozicio, ekzemple: *por kio?* - celo, *kial? (pro kio?)* – kaŭzo.

---

[3] prezentaĵo - NdlR

Apartan instruon bezonas aplikado de respondoj al la demando: *kiam? kiom da?* Utilas helpaj mediatoroj[4] (vidu 1, 2, 3) kaj aldono.

Rilate al subjekto (orbito 1) ni atentigu pri la ŝanĝoj semantiko-strukturaj el aktivo al pasivo, ekz.: *Mi legas libron – La libro estas legata de mi.* En ambaŭ frazoj kiel aganto rolas *mi*. La subjektoj estas *mi* kaj *la libro*.

Ekzercoj:

1.

donas al	**ricevas de**
X donas ion al Y ⟶	*Y ricevas tion de X*
X ricevas dankon de Y ⟵	*Y sendas dankon al X*

2.

vendas al	**aĉetas de (en)**
X vendas ion al Y ⟶	*Y aĉetas ion de X*
X ricevas monon de Y ⟵	*Y pagas per mono al X*
rezulto de ago:	rezulto de ago:
X posedas monon (ricevitan) de Y	Y posedas aĉetaĵon (aĉetitan) de X

3. Kiu? Irena Szanser

Kion faras? ***verkas*** *artikolon.*
Pri kio? pri la Parolgenerilo.
Kiel? eble ŝi tion faras ne sufiĉe klare.
Por kiu(j)? por lernantoj kaj instruistoj.
Kial? (pro kio?) pro amo al Esperanto, pro ĝia granda valoro por la mondo.

4. Kiu? X, Y, mi…, … ***veturas***

Kien? al Afriko.
Per kio? per luksa aviadilo.
Kiel?... tre longe sed komforte.
Por kio? por partopreni en la ILEI-Konferenco en Benino.
Kiam? je la 10-a horo matene, en lundo (lunde) (je) en/la 2a de julio de 2008 (jaro).
Por kiom longe? por unu monato.
Kial por unu monato? pro unumonata libertempo.

5. sidas

Kiu?- tiu maljuna sinjoro en la griza mantelo.
Kie?- en la parko, sur la benko, ĉe la granda arbo, apud la domo.
Kiel?- sole, trankvile.

---

[4] rimedoj (pli strikte: perantoj) – NdlR

Kiam? - *dum matenoj, de la 8-a ĝis la 10-a.*
Por kio?- por pensi kaj ripozi.
Kial?- pro sopiroj al junaj jaroj.

Referencoj:

1. *Semantika resumo de la Esperanto-gramatiko.*
2. *Semantika enhavo de la verba funkcio (kern-funkcio)* kaj aliaj artikoloj en *Elektitaj verkoj en Esperanto* de Irena SZANSER, en la elektronika formo por eldono.
3. *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* de Irena SZANSER, ILEI, Budapeŝto 1992, p. 121-124.

El la landoj kaj sekcioj…

Benino



La 1-an de novembro 2008 okazis en la lernejo Aguidahoué seminario por la plej junaj lernantoj en Aguidahoué (grupo "Glorata estu Dio"). Gvidis la seminarion la neregistara organizo "Afrika centro mondcivitana". Kadre de la seminario oni havis E-lecionojn kaj krom la ekzercado oni parolis pri la internaciaj organizoj kiel UEA, ILEI kaj SAT. Partoprenis ankaŭ la instruisto Norbert METOHOUE, kiu gvidas la klasan kurson en la lernejo por havi novan sperton pri instruado. La lernantoj bone parolas kaj skribas la lingvon kaj ŝatus korespondi poŝte. Aguidahoué estas vilaĝo situanta malproksime de la urbo Lokossa. La lernantoj ŝatus konatiĝi kun la interreto. Pro tiu deziro "Afrika centro mondcivitana" decidis organizi apartan seminarion por ili pri la uzado de interreto. La grupo ŝatus akcepti interesiĝontojn (enlande kaj/aŭ eksterlande), kiuj pretus instrui en la lernejo Aguidahoué. La vojaĝkostojn pagos „Afrika centro mondcivitana".

Informis: François HOUNSOUNOU

Brazilo

La 25-an de oktobro, Lorena E-Klubo okazigis unu plian "Subĉielan Lecionon".

Ĉi-foje, ni vizitis la bieneton kaj la domon, kie naskiĝis la fama brazila verkisto Monteiro LOBATO – la "Bieneton de la Flava Pego", en la urbo Taubaté, ŝtato San-Paŭlo.

Partoprenis dek unu gesamideanoj el kvar urboj: Lorena, Guaratinguetá, Jambeiro kaj Fortaleza (!).

En bela vetero, la grupo legis biografieton de Monteiro LOBATO kaj praktikis dialogon pri la teksto. Poste oni lernis la nomojn de pluraj birdoj en E-o. Sekvis promeno tra la bela bieneto kaj vizito al la domo, kiu funkcias kiel muzeo. Oni fotis la grupon kaj multaj turistoj atentis pri nia uzado de E-o kaj pri la verda flago.

Post la promenleciono la grupeto manĝis en agrabla restoracio, en Taubaté.

Oni planas okazigi proksiman "Subĉielan Lecionon" en Lorena, komence de 2009, ĉe "Bieneto de Floroj".



Informis: Paulo Sérgio VIANA

Germanio

Studsesio-sistemo de Interkultura Centro Herzberg (ICH) por instru-kapabligado, klerigado, pluklerigado: estas ellaborata modul-sistemo por trejnado de instruantoj, kursgvidantoj. La enhavo de la moduloj estas en harmonio kun la postularo de la lingvopedagogia kurso de UAM. Temas pri kompleksa lingva kaj faka kursaro, prelegsesioj pri metodiko, literaturo, lingvistiko, historio, kulturo, informado, varbado, movadaj konoj ktp. Ekzamenoj laŭ la *Komuna Eŭropa Referenckadro (KER)*. Planataj sesioj por akiri kreditpoentojn en 2009: Pasko-semajno:10-14 aprilo, 01-03 majo, 02-09 aŭgusto, 09-12 oktobro (Torpedo-5), 11-13 decembro (kun jubilea Zamenhof-festo)

Detaloj: Zsófia KÓRÓDY, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz

***

AGEI-kunsido dum Eŭropa Es-Kongreso/Germana E-Kongreso, 28.05-03.06.2009 en Herzberg am Harz. La ĉeftemo de la kongreso: E-o por mult-kultura Eŭropo. La Asocio de Germanaj E-Instruistoj (AGEI) okazigos sian jarĉefkunvenon dum tiu evento. Strategiaj planoj por E-instruado, kun-ordigo de fakaj laboroj. Ellaboro de kaj partopreno en internaciaj projektoj.

Detaloj: http://gek-eek.esperanto-urbo.de aŭ
Zsófia KÓRÓDY, prezidanto de AGEI, zsofia.korody@esperanto.de

***

Oferto por lernemuloj, staĝantoj de 1 semajno ĝis 1 jaro ĉe Interkultura Centro en Herzberg am Harz, Germanio. Lingva kaj movada trejnado por staĝantoj. Ege favoraj kondiĉoj (jam de 100 EUR/monato):

– lingva, movada spertiĝo en medio, kie E-o estas ĉiutaga laborlingvo;
– faka spertiĝo je instruado en lokaj lernejoj kaj junulara laboro;
– metodika spertiĝo observante-provante;
– spertiĝo en tradukado, ĉiĉeronado;
– spertado de la organiza, administrada laboro de Esperanto-Centro;
– kunorganizado de renkontiĝoj, konferencoj;
– kaj amuzado, partopreno en oftaj E-eventoj okazantaj dumjare;
– helpado ĉe kunkonstruo de E-urbo**;**
– uzo de biblioteko, arkivo, son- kaj filmkolektaĵo;
– moderna loĝejo kun 3 ĉambroj en la urbocentro, do eĉ por 2-4 personoj paralele;
– bone ekipita kuirejo (kuirejaj maŝinoj, eĉ telerlavilo)

Ankaŭ por ekstereŭropanoj! La unua kvarmonata periodo bonege sukcesis inter aprilo-julio 2008. Aŭtune dum 3 monatoj staĝis junulo el Koreio.

Detaloj: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, esperanto-zentrum@web.de

Nederlando

D-ro. inĝ. W.H. JANSEN (1948) estis nomumita speciala profesoro pri Interlingvistiko kaj E-o ĉe la Fakultato de Homaj Sciencoj de la Universitato de Amsterdamo (UvA). La katedro estas kreita de la Fondaĵo Internacia E-Instituto. Wim JANSEN por sia instruado enfokusigas interlingvistikon (scienco pri la artefaritaj lingvoj) kaj la akiradon de la lingvo E-o. Lia esploro ĝis nun koncentriĝis en la sintakso kaj tipologio de E-o. Jansen finstudis pri Aviadilkonstruado en Delft (1970) kaj pri Kompara Lingvistiko specialiĝinte pri la eŭska en Leiden (1989). Post kariero en la eŭropa astronaŭtiko li aktiviĝis kiel publikigisto kaj lingvoinstruisto en la plenkreskula edukado. Li ekzemple publikigis la unuan vortaron eŭskan-nederlandan. Ekde 2002 JANSEN estis universitata instruisto pri Interlingvistiko kaj E-o ĉe la sekcio Lingvistiko kaj Literaturo de UvA. Dume li verkis tezon pri la vortordo en E-o, per kiu li promociiĝis en 2007 ĉe UvA. *Atilio ORELLANA ROJAS*

Pollando

UAM/ILEI instruista trejnado en Poznań, laŭ komuna instruprogramo, (1-jara, metodika, kun prelegsesioj pri literaturo, lingvistiko, movado, kulturo. 2-foje unusemajna ĉeesta, dumjara faka distanclernado), akiro de UAM/ILEI-diplomo. Sekva kurso: septembro 2009

Grava alvoko: lernu pri la supre menciitaj fakoj kaj fariĝu E-instruisto! Akiru renoman atestilon pri lingvoinstruado!

Detalojn pri la studoj, studprogramo bv. peti de *d-rino Ilona KOUTNY, akademiano, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj en Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznań*

***

Grupo de bazlernejanoj en la vilaĝo Rdziostów, 8 km-ojn for de Nowy Sącz (en la suda parto de Pollando, ĉ. 30 km-ojn de la slovakia limo) serĉas kontaktojn tutmonde [*vd la foton sekvapaĝe – NdlR*]. Ili aĝas 9-11 jarojn kaj komencis la E-lernadon en oktobro 2008.

Kontaktu la instruistinon Jolanta KIERES rete: <*jola11k@interia.pl*>



Serbio

La 12-an de decembro 2008 en la lernejo por gelernantoj kun difektita vidpovo „Veljko Ramadanović“ en Zemun oni festis la tagon de la lernejo (la dato de la fondiĝo de la lernejo antaŭ 91 jaroj). Kiel ĉiam, en la programo partoprenis ankaŭ anoj de la E-sekcio de la lernejo.

Ĉi-jare la gelernantoj prezentis poemon de la plej konata serba porinfana poeto Jovan JOVANOVIĆ ZMAJ „Petro kiel doktoro“. La poemon tradukis s-ano Zlatoje MARTINOV kaj publikigis en sia libro „Al la mondo donace“. La solenan okazaĵon vizitis multaj gastoj, inter kiuj ankaŭ delegitoj el la ministerio por klerigado.



En la lernejo E-o estas instruata ekde la jaro 1920. Kadre de la lernejo estas elementa kaj meza gradoj. El ambaŭ gradoj E-kurson frekventas po unu grupo da gelernantoj.

Etelka KISS-JAKUPOVIĆ

Pri "Misfrazoj" (en IPR, 08/4, p.28-29)

Mi ĝojas, ke denove estas rubriko de Rob MOERBEEK en IPR. Sed ĉi-foje mi ne estas tute kontenta pri ĝi. Se mi, ekzemple, legas la frazon n-ro 4 "Kion ajn li asertu esti, li ne devu konduti sin tiom fremda", tiam mi tute ne komprenas la frazon. Kiel mi do povus korekti ĝin??? Nur s-ro MOERBEEK povas fari tion, ĉar nur li scias, kion li intencis skribi!

Tial mi proponas jenon: Unue s-ro MOERBEEK skribu la ĝustajn frazojn. Poste li aldonu la misfrazojn (skribitajn de iu lernanto). Nun sekvu la tasko por la legantoj (la instruistoj), ke ni klarigu al la lernanto, kial kelkaj frazopartoj estas malĝustaj. Tiujn klarigojn ni sendu al vi. Tiam vi havos belan reagon al via revuo kaj vi povos skribi: "s-inoj x x kaj s-roj x x sendis bonajn klarigojn". Kaj poste vi aldonu la ĝustajn klarigojn kaj per tio ni povus kompari niajn klarigojn kun la ĝustaj. Tiel ni mem povus multon lerni. Pri la solvoj sur paĝo 29 mi havas jenan komenton:

1-a frazo: "Kiam ni revenis hejmen" estas malĝusta solvo, ĉar "reveninte hejmen" signifas "Kiam ni estis revenintaj hejmen". Samtempeco estus "Revenante hejmen".

4-a frazo: "tiel (tiom) strange". Oni nepre devas klarigi la diferencon inter la normala gradesprimo de la konduto kaj la eksterordinareco de tiu konduto.

7a frazo: La germana vorto "abholen" estas "iri por preni", kiel la "lernanto" ĝuste skribis. "Irpreni" estas terura vortkunmeto. Provu analizi ĝin!! Krome PAG jam avertis pri la problemo uzi du infinitivojn kune "veni preni", kiuj ankaŭ sonas terure.

11a frazo: Devas esti: (ĝuste nun ating**is**)

Josef SCHIFFER, Germanio

Pri „Kiel mi perdis 5 jarojn…" (en IPR 08/1, p.18-22)

Leginte en IPR 2008/1 la leteron de d-ro Lajos MOLNÁR, oni povas bone kompreni la kialojn pri la sintenoj de la plej multaj homoj, kiuj tute malmalice, plenfide submetiĝas al la aŭtoritatulaj plej disvastigitaj opinioj. Por juna menso, se ne fidi al la "kleraj" societaj modeloj, kiel universitataj profesoroj, al kiu rigardi?

Vere kortuŝa estas la reago de prof. Claude PIRON, kies malapero estas katastrofa perdo por la tuta E-movado, kiu laŭ sia tuta vivo cerbumis

por kompreni ĝuste tiujn psikologiajn mensprocesojn. Li mem diras, ke li multon komprenis, sed ne komplete kaj ke ankoraŭ ne eblas “digesti” la antaŭjuĝajn, preskaŭ tabuajn, superstiĉajn rifuzojn al io entute feliĉiga. Malgraŭ lia nerefutebla, vaste rekonata kompetento, tamen li konscias, ke la streboj diskonigi studojn kaj konkludojn pri tio ne sufiĉas por konvinki multajn homojn, pri la bono de nia afero.

Dum mia pli ol kvindekjara esperantista vivo, mi multfoje gvidis kursojn, prelegis, verkis en la sama direkto, danke al miaj studoj pri sociologio, psikologio kaj antropologio, certe neniel kompareblaj kun tiu de la kara Piron, sed kiel li, mi spertis la ekziston de la samaj baroj eĉ inter la esperantistaro. Tre ofte, kvankam donante vivantajn ekzemplojn, mi konstatis, ke la plej multaj amikoj de la lingvo samideanas nur dum kurso, renkontiĝo, kongreso, sed ekstere malmultaj aŭ neniu scias pri iliaj pensoj kaj faroj tiurilate. Provoke, ankaŭ al si mem, oni povas diri: "Ĵetu la unuan ŝtonon, kiu neniam kaŝis sian esperantistecon", ĉu por eviti mokojn, ĉu por ne perdi prestiĝon ktp., eble por poste bedaŭri pro la perditaj okazoj, sed tiam mankis kuraĝo aŭ plena konvinko, kelkaj poste eĉ suferas kulpokompleksojn. Koncerne al tio mi multfoje tuŝis la temon de la psikologia dependo de la homoj per artikoloj kaj prelegoj, bedaŭrinde nur kun la etaj rezultoj aluditaj de la supraj aŭtoroj.

En la intenco kontribui por pli profunda studado kaj kompreno de la tre verŝajne plej grava temo por ni esperantistoj, t.e. kiel venki la antaŭjuĝan reziston kaj akran, eĉ koleran rifuzon al nova lingvo, por pli bona kompreno de la homa pensmaniero kaj sekva agmaniero, mi sendas tekston, en la espero, ke ĝi utilos al ĉiuj por daŭrigi la meditadon, sed ĉefe al tiuj kiuj instruas kaj devas transirigi ne nur gramatikerojn, sed aparte profundajn konvinkojn. Mi ŝatus ricevi viajn opiniojn pri tio. Mi antaŭ-dankas pro la bonvola atento. Kun la plej elkoraj amikaj sentoj:

Romano BOLOGNESI, d-ro pri sociologio, IFEF-Prezidanto

Pli da pesado ĉe la uzo de simpligoj!

de **Johano PETIK** ***(Hungario)***

La klopodo simpligi la esprimojn ĝis la limo de ebloj karakterizas (kaj ĉiam –is) la parolantojn-uzantojn ne sole de E-o, sed ankaŭ de iu ajn artefarita aŭ etna lingvo. Problemoj estiĝas nur, se oni transpasas la limojn de ebloj. En E-o troviĝas eĉ ne unu el tiaj esprimoj, ĉe kiuj oni povas

demonstri tiun transpason. Kelkajn el ili mi prezentis en mia broŝuro (titolita „Kritikaj rimarkoj pri la lingvo Esperanto”), nun mi vortigas plian kazon ĉi tian, tie ne menciitan.

Temas pri la modo uzi tiajn simplegajn esprimojn, kiel „dankon”, „bonvenon” k.s. anstataŭ ilian plenan formon „mi dankas (vin/al vi)”, resp. „vi estas/estu bonvena” k.t.p. aŭ (kiel vi tion vidos malsupre) ilian gramatike pli taŭgan formon simplan. Kiel tion ankaŭ la titolo sugestas, mi volas ne kategorie pledi kontraŭ la formo simpla (mallonga), ĉar la menciita klopodo simpligi restas kaj restos daŭre akompananta la lingvo-uzadon. La kompleta kaj simpla formo mem vehiklas sian respektivan krominformon sekundaran – la motivon por uzadi la simplan formon prezentas supozeble la bezono esprimi ĉi tion. (Ekz. la formon „Mi dankas vin/al vi.” ni uzadas celante esprimi profundan dankemon pro ia ricevita servo, komplezo, kiam la nura dankado eble „valoras” malpli ol la servo, komplezo. En ĉi lasta kazo ankaŭ la respondo estas „nedankinde”.) La nuna modo uzadi pleje la mallongan formon ŝajnas havi la kromefikon eklipsi la eblon povi esprimi ambaŭ krominformojn.

Ĉe instruado, tio evidentas, ni konatigas ambaŭ formojn de la respektivaj esprimoj, kaj tio estas konsilinda atentigi ankaŭ pri iliaj sekundaraj funkcioj. Sed ekzistas ankaŭ plia konsidero, kiu igas nin esti pli ol ĝis nun singardemaj rilate la uzadon de la mallongaj formoj (kaj ne mankigi la mencion ankaŭ ĉe instruado).

Mallongaj formoj do ekzistas ankaŭ en etnaj lingvoj: la ekvivalento ekz. por nia „dankon” en la angla estas „thanks”, en la germana „danke”, en la hungara „köszönöm”, en la slovaka „ďakujem” k.t.p. Rimarku, ke ĉe ĉi tiuj ekvivalentoj la formo akuzativa substantivo troviĝas (eble) en la angla (la malcerton ĝiakaze kaŭzas la manko de morfemo por la akuzativo). Anstataŭ plena konatigo mi mencias ankoraŭ la ekvivalentojn de nia „gratulon”: angle: „congratulations”, germane: „gratuliere”, hungare „gratulálok”, slovake „gratulujem”. Do, la formo akuzativa substantivo ankaŭ ĉi tie troviĝas, krom en E-o, (eble) sole en la angla. Tio ĉi induktigas la konkludon, ke la mallonga formo konvenas unuavice en lingvoj kun fleksiaj verboj, dum en nia E-o la verboj estas nefleksiaj. Ĉi tiel nia „dankon”, „gratulon” k.s. rigardeblas kiel lingvaj unikaĵoj, idiomoj. Sed temas nur pri idiomoj?

Antaŭ ol provi respondi ĉi tiun demandon, ni devas ankaŭ iom esplori la demandon, ĉu la uzado de la akuzativo en tiuj kazoj estas tiel memkomprenebla, kiel la disvastiĝo de la entema modo tion sugestas. Se

konsulti la solan referencan lingvon (alm. en Eŭropo), en kiu la akuzativa morfemo ekzistas, la hungaran, ni trovas, ke tiun formon – ĉe unuvortaj esprimoj, kiel ankaŭ niakaze – oni uzadas por esprimi postulon. Ilustre mi mencias tiajn ordinarajn postulojn de senlaboruloj (laboristoj k.s.), uzatajn ĉe manifestacioj, kiel „Munkát! Kenyeret!” (= Laboron! Panon!). Simila formo troviĝas ankaŭ ekz. en la refreno de poemo de J. Baghy „Ne plu militon! Pacon, nur pacon!”.

La lakona akuzativa formo do ankaŭ en E-o esprimas pleje postulon, kio metigas la demandon, ĉu ankaŭ kaze de „dankon” k.s. temas ne pri postulo. Des pli, ĉar ekz. gepatroj povas ankaŭ ĉi tiel postuli de siaj tre junaj idoj la mankigitan (/forgesitan) esprimon de dankado, salutado k.s. Ni do devus esti pli singardaj ĉe la uzado de la akuzativa formo en tiaj kazoj.

Konsideru, ke Z verŝajne pensis jam ĉe la fontoj pri la afero, inventante tiajn formojn (alternativajn), kiel *dank'*, *salut'* (eble eĉ *pardon'*). Ankaŭ mi do konsilus uzadi ĉi tiujn, pli taŭgajn formojn anstataŭ la enmodajn.

Ripetiĝantaj fuŝoj en la informado pri Esperanto

de Thierry SALOMON

"*Estu tre singarda kun viaj vortoj, ĉar alie vi atingos ĝuste la malon de tio, kion vi deziras atingi*!" (L.L. Zamenhof en letero al L. Couturat 1907.01.13 Esperanto XVII 1921 n-ro 247 p.44, plena verkaro p.442)

En pluraj tekstoj la ĵus forpasinta svisa psikologo Claude PIRON klarigis, ke ofte la kontraŭstaro kaj la nekompreneble akraj atakoj rilate al E-o radikiĝas en subkonsciaj timoj. Tial dum informado pri E-o, necesas eviti la riskon de malbonaj elvokaĵoj kaj de miskomprenoj.

Ofta antaŭjuĝo

Unu el la plej oftaj antaŭjuĝoj rilate al E-o estas, ke ĝi celas anstataŭi la aliajn lingvojn. Pro tio en la unuaj du frazoj de via informilo aŭ alparolo, anstataŭ ĉiam komenci per Zamenhof (kio certe povas aspekti kiel persona kulto kaj eĉ iom sektece), nepre indas malebligi aŭ korekti tiun

miskredon. Alikaze via tuta argumentado, kiu sekvos, ne utilos eĉ se ĝi baziĝas sur la plej raciaj pensoj, ĉar la leganto/aŭskultanto reagos emocie. Tuj ĉe la komenco vi povas diri ekzemple, ke E-o estas lingvo por faciligi la komunikadon inter personoj, kiuj ne havas saman gepatran lingvon.

Pro la sama antaŭjuĝo evitendas miskompreneblaj esprimoj kiel „universala lingvo", „unu lingvo por la tuta mondo", „tutmonda lingvo", „komuna lingvo por la tuta mondo"... Anstataŭe vi povas uzi „interkultura", „interpopola", „intergenta", „internacia". Vi povas eble eĉ emfazi la „inter" (ekzemple INTERnacia). Same ne uzu la esprimon „problemo de la plurlingveco" anstataŭ „problemo de la lingva baro", alikaze la publiko pensos, ke vi volas forigi la problemon de plurlingveco, tio estas forigi plurlingvecon mem...

Ofta baza argumento

La facileco de la lingvo estas la ĉefa argumento en la plej multaj informiloj. Bedaŭrinde por tio ofte estas uzata la vorto „simpla", kiu havas pejorativan signifon en multaj lingvoj. Pli bone estas uzi la esprimon „facila lingvo" aŭ pli precize „la malplej malfacila". Alikaze oni riskas sugesti la ideon de malriĉa lingvo. Cetere facileco ne estas kialo por lerni ion. Estas multaj aferoj, kiujn eblas facile lerni sed estas bonaj por nenio. Por la publiko estas pli interese scii, ke E-o estas lernebla amuziĝante.

Por eviti la miskredon pri malriĉa lingvo, vi povas montri librojn (tradukojn de famaj literaturaj verkoj, aŭ originalajn verkojn). Anstataŭ facileco via ĉefa argumento povas esti „interkultura dialogo", „nediskriminacia interpopola komunikado", „uzebla en multaj landoj", „lerni E-on estas pli amuze ol ludi sudokon", ktp... depende de via celpubliko.

Sudamerika aŭ afrika landeto?

Pro la sciostrukturo en la cerbo, la publiko havas ankaŭ problemojn „digesti" la ideon de lingvo ne ligita al lando. Tial oni prefere ne malfaciligu tion per tipaj naciaj simboloj: flago, kiu aspektas tiel kiel tiuj de lando, kaj himno. Ankaŭ esprimoj kiel „diasporo", „Esperantio/ujo" estas evitendaj pro la sama kialo.

Pliaj diversaj evitindaj esprimoj:

- „artefarita lingvo", „kreinto", „havas nur 16 regulojn", „apartenas al neniu".

- „La internacia lingvo”: Se vi uzas la frazon kun „la”, la publiko kontraŭos, ke la angla estas la internacia lingvo.
- „Dua lingvo por ĉiuj”: elvokas ideon de devigeco. Multaj homoj estas plurlingvaj, do E-o simple ne povas esti ilia dua lingvo. Ĉu ĉiu homo devos lerni ĝin?
- Vortoj, kiuj povas havi politikan aŭ totalisman elvokaĵon: „movado”, „samideano”, „fina venko”, „ligo”, „-ista junularo”, „propagando” kaj en kelkaj lingvoj kaj kuntekstoj la sufikso „-ist”.
- Malveraĵoj: „Albert Einstein apogis E-on”, „pola Zamenhof”, „ne havas esceptojn” ktp...

Prakaŭzo de multaj informadaj fuŝoj

Verŝajne la plej granda problemo pri la E-informado estas, ke tiuj, kiuj verkas la tekstojn, ne metas sin aŭ ne kapablas meti sin en la lokon de tiuj, kiuj ne konas E-on. Kelkaj ekzemploj: por iu, kiu jam konas E-on, estas evidente, ke:

- Ĝi ne volas forigi la aliajn lingvojn.
- Sur nigra-blanka informilo nigra stelo simbolas verdan stelon.
- En ekzemplofrazo en gazeto aŭ aliloke, kie ne eblis uzi la ĉapelitajn literojn, la iksoj estas nur anstataŭiloj por supersignoj, ktp.

Por la ĝenerala publiko, tiuj punktoj tute ne estas evidentaj...

Pluraj miskomprenebleĵoj fortigas unu la alian[5]

Miskomprenebla esprimo aŭ ilustraĵo ne kaŭzos misinterpreton ĉe ĉiu, sed RISKAS fari tion ĉe KELKAJ personoj. Do tiu teksto ne asertas, ke ekzemple „universala lingvo” estos miskomprenita de ĉiuj. Sed se por vi ĝi tute ne estas miskomprenebla, tio ne signifas, ke la samo estas vera por ĉiuj. Ĝenerale unu tia diversmaniere komprenebla vortumo aŭ desegno ne tro damaĝas. Sed se estas pluraj tiaj, ilia efiko obliĝas. Kaj bedaŭrinde en tipa varbilo por E-o troveblas multaj tiaj aferoj...



[5] *NdlR: Kion vi vidas sur la supra (dusenca) grafikaĵo?*

Kontrololisto

Jen sube propono de kontrololisto por provi elkribri la kutimajn erarojn dum informado pri E-o. Bedaŭrinde eblas sperti, ke la esperantistoj pli volonte pretas reformi la tutan lingvon ol ŝanĝeti siajn ĉi-temajn kutimojn. Kaj dume la fambildo de la lingvo ne boniĝas kaj la rebatservoj plejparte servas nur al estingo de fajroj, kiujn oni iel mem ekigis...

- Ĉu vi difinis vian celogrupon kaj adaptiĝis al ĝi?
- Ĉu vi legis bazajn tekstojn aŭ librojn pri E-informado? Se vi ne konsentas pri kelkaj iliaj konsiloj kaj decidas ne sekvi ilin, ĉu vi faris opinienketon en via celgrupo, kiu montris, ke vi povas preterlasi tiujn konsilojn? Aŭ ĉu tiu decido baziĝas sur antaŭsupozo via?
- Ĉu vi metis vin en la situacion de iu, kiu ne konas E-on?
- Ĉu la varbilo ne estas miskomprenebla?
- Ĉu vi racie pripensis kaj planis ĝin, aŭ ĉu ĝi sekvas nur kelkajn malnovajn kutimojn kaj simple reuzas la tradiciajn sloganojn kaj ilustraĵojn?
- Ĉu ĝi vere estas taŭga por informi pri E-o, aŭ ĉu ĝi nur estas fanfaronilo pri E-o aŭ esperantismo.
- Ĉu ĝi ne estas tro longa?
- Ĉu ĝi estas bone legebla kaj ĉu la koloroj harmonias?
- Ĉu vi provis ĝin kun kelkaj homoj antaŭ ol uzi/multobligi ĝin?

Literaturo

– Retejo pri E-informado kun bibliografio, citaĵoj, arkivo de kaj ligoj al bazaj tekstoj kiel la „Principaro de informado pri la internacia lingvo", „Por pli efika informado", ktp... *http://interpopolalingvo.inf.hu*
– Filmetoj kaj bildoj pri miskompreneblaj simboloj: *http://www.ipernity.com/doc/32070*
– Artikoloj de *Claude PIRON* pri la psikologiaj reagoj koncerne E-on (en pluraj lingvoj): *http://claudepiron.free.fr/articles.htm*
– Listo de miskredoj pri Esperanto (hungare): *http://groups.yahoo.com/group/esp-en-hung/message/11721*
– Reta Informado-Centro (RIC): *http://informado.net/article.php?a=23, http://informado.net/index.php?art=3*

La novtipa UEA-ekzameno sukcese premieris

Post kelkjara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova E-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER) kaj ofertas egalrangan mezuradon de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en la niveloj B1, B2 kaj C1. Partoprenantoj de la *Internacia Festivalo* (IF) en Düsseldorf havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon. Sume 8 personoj el 6 landoj uzis la eblon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon, bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la ĉiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo kontraktita kun la *Ŝtata Lingvoekzamena Centro* (ITK) en Budapeŝto, Hungario, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelajn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La surlokajn buŝajn ekzamenojn en Düsseldorf gvidis Renato CORSETTI kaj Zsófia KÓRÓDY, ambaŭ trejnitaj ekzamenantoj laŭ la KER-postuloj. UEA kore gratulas la unuajn ekzamenitojn, kiuj bonege sukcesis en la buŝa parto. Estas ĝojige, ke tiom multaj ekzameniĝantoj anoncis sin malgraŭ la jarfina festo kaj la mallonga tempo, kiu restis post la fina decido okazigi la ekzamenojn ankoraŭ en 2008.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum la Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 aprilo; dum la *Malferma Tago* en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en majo; kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando) en julio.

Pli detalaj informoj pri la ekzamenoj: *<http://www.edukado.net /pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422/>*

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 314.

Somera Esperanto-Studado ankaŭ somere 2009

Jam trian fojon okazos **SES** (Somera Esperanto-Studado) ĉi-somere. Pro la bela kaj taŭga loko ĝi okazos samloke kiel last-jare, en la ĉarma urbeto Modra-Harmónia en Slovakio, nur 30 km de Bratislava, 90 km de Vieno kaj ĉ. 220 km de Budapeŝto. Ĝi okazos **inter la 10-a ĝis la 18-a de julio 2009** – dato speciale elektita por ke oni povu daŭrigi sian someran E-umadon en IJK (estas preparata komuna vojaĝo), aŭ en ILEI-Konferenco en Krakovo. La programo de la aranĝo konsistas el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze – instruado de E-o;
- Posttagmeze – ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;
- Vespere - kulturaj programeroj: Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, vingustumado, diskoteko...

La instruadon gvidos spertaj E-instruistoj en 4-5 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Fine de la aranĝo la partoprenontoj ricevos atestilojn pri la 26-hora kurso, laŭ la niveloj de nova referenckadro de A1 ĝis C1.



Surfote: ekskurso de SES-anoj en Vieno dum SES 2008

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos *lernu!*-teamo. Eblos ĉeesti plurajn prelegojn pri *lernu.net*, pri la traduk-sistemo de la paĝaro, laborgrupon pri la estonto de la projekto. La teamanoj estos je via dispono dum la tuta semajno: eblos kun ili diskuti, demandi, proponi ion ajn, rilate al la paĝaro. (Rim: La *lernu!*-parton de la programo kunfinancas *ESF* (*Esperantic Studies Foundation*), kiu financas ankaŭ la kreon kaj funkciadon de *www.lernu.net* kaj kelkajn aliajn projektojn de *E@I*. Aldona kunfinancanto de SES 2009 estas „Ido-fondaĵo“ el Svedio.)

Kunlabore kun ILEI aperas ĉi-jare nova eblo: por progresintoj, instruemuloj (la plej altnivela grupo) – seminario „Flugiloj de malfacila vento“ kaj por spertuloj, pretaj estonte eĉ gvidi similajn seminariojn ankaŭ seminario „Gvidu la flugilojn“. Plua novaĵo de la aranĝo estas eblo pasi ILEI-ekzamenojn, kion deziris pluraj pasintjaraj partoprenantoj.
Pli da informoj riceveblas de *ses@lernu.net* aŭ ĉe *www.lernu.net.*[6]

Peter BALÁŽ, E@I-kunordiganto, SES-organizanto

Pri nia konferencejo en Krakovo

La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości – WSZiB) en Krakovo invitas al unuagradaj studoj pri sociologio, informadiko, direktado, financoj kaj kontado, samkiel al studoj duagradaj (SUM).

WSZiB estas moderna altlernejo. Ni emfazas la scipovon de memstara pensado kaj decidado, al kio servas negocaj simulludoj, utiligataj dum la lecionoj. Diplomito de WSZiB kapablas fondi propran firmaon kaj bone regas fremdan lingvon. La programo de la studoj inkluzivas ankaŭ kursojn de jenaj elekteblaj fremdaj lingvoj: la angla, la germana, la franca, la itala, la hispana, la rusa kaj Esperanto.

En la instruado estas utiligataj modernaj metodoj de e-lerno. La lernejo disponas pri modernaj komputilaj ĉambroj, bonega hardvaro (ĉirkaŭ 600 komputilaj laborlokoj kun konstanta retkonekto, sendrata enlerneja Wifi-reto) kaj ofertas multajn aldonajn kursojn de la tipo *CISCO Systems* aŭ *Microsoft* por plilarĝigi la informadikan scion. WSZiB estas ankaŭ renoma ekzamena centro de *Pearson Vue* kaj EDCL (Eŭropa Certigilo de

[6] Raporto pri la pasintjara SES legeblas en IPR 2008/3, p.35-38. – NdlR

Komputilaj Scipovoj). En WSZiB oni povas akiri prestiĝan certigilon de sciado pri financoj – ACCA.



La programo de la studoj entenas devigan trejnadon, dum kiu la studentoj havas okazon elprovi siajn sciojn kaj kapablojn. En WSZiB dinamike funkcias ankaŭ Kariera Oficejo, kiu okupiĝas pri eksterlandaj trejnadoj, laborofertoj kaj staĝoj.

WSZiB havas bone funkciantan sistemon de stipendioj. La studentoj kun konforma poent-averaĝo lernas senpage aŭ ĝuas partan elspezrepagon. Jam dum la unua studjaro oni povas studi senpage aŭ kun granda kostredukto, se oni ekhavis Diamantan (kun la valoro de 2000 zl semestre) aŭ Oran (kun la valoro de 1000 zl semestre) Studlibreton de WSZiB.

En 2005 la lernejo estis distingita per "Premio de la Studenta Medio 2005", kiu estas atribuata de la Studenta Parlamento de Pola Respubliko en la kategorio "Studento-amika lernejo".

Konkurso por ILEI-Konferenco 2011

ILEI estas la ununura E-organizo, kiu konferencas en ĉiuj kontinentoj:

2007 – Azio (Ranzan, Japanio)
2008 – Afriko (Portonovo, Benino)
2009 – Eŭropo (Krakovo, Pollando)
2010 – Ameriko (Kubo)
2011 – proponu vi!

ILEI-Konferenco povas okazi ĉie, kie estas aktivaj e-istoj. Ĉu vi ŝatus partopreni en tiu tre grava evento – kunveno de E-instruistoj – veraj kaj ĉefaj disvastigantoj de la lingvo? Ĉu vi revas, ke la plej aktiva e-ista faka asocio konferencu ĉe vi? – Neniu problemo! – Invitu la ILEI-Konferencon!
Tiukaze vi havos eblecojn:

– konatigi la mondan esperantistaron kun via agado surloka,
– montri al via loka medio, kiom utilas Esperanto,

– preskaŭ senkoste partopreni en unu el plej gravaj movadaj eventoj,
– perfektigi vian lingvokonon, interŝanĝi spertojn,
– trovi amikojn kaj kolegojn por profesia agado.

Por pretigi la inviton bonvolu trafoliumi la lastajn jarkolektojn de IPR kaj rigardi la informojn pri la pasintaj konferencoj en la retpaĝo de ILEI – *www.ilei.info* – ĉe *Konferenco* aŭ rekte en *http://www.ilei.info/agado/ index.php?lingvo=eo* aŭ kontakti la estraron de ILEI.

Via propono kaj la subskribita Konferenca Regularo (ĝi troveblas en la retpaĝo de ILEI ĉe *Dokumentoj*) devas atingi la estraranon pri konferencoj ĝis la 1-a de majo 2009. Adreso: *Aida ČIŽIKAITĖ, Kapiniu 11- 15 LT-50189 Kaunas Lietuva/Litovio, aidute@mail.lt.*

La estraro traktos ĉiujn proponojn kaj ĉiuj proponintoj ricevos respondon pri la elekto de la konferenca loko. La celo estas sufiĉe frue anonci pri la elektita loko kaj dato por tre bone pretigi la konferencon, por allogi kiel eble plej multe da partoprenantoj, por fari nian konferencon ŝatata kaj prestiĝa E-aranĝo, al kiu kunvenu ne nur instruistoj kaj instruantoj, sed ĉiuj lingvemuloj. Aliĝu al nia teamo invitante la konferencon en 2011! Por vidi, ke vere valoras partopreni kaj inviti ILEI konferencon – venu al Krakovo kaj spertu mem.

Aida ČIŽIKAITĖ,
estrarano de ILEI pri konferencoj



Sur la foto de Adam WILKUS: Barbakan en Krakovo

NdlR – Detalan informilon kaj aliĝilon por la 42a ILEI-Konferenco en Krakovo oni trovas en IPR 2008/4 sur paĝoj 34-40. La aktualajn konferencajn informojn (varbiloj, alvokoj, reta aliĝilo ktp) serĉu ankaŭ en la retpaĝo: *http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php*.

kzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár
lekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
ontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
erneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
egulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
erminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).
IPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
ĈI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
EJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (*http://www.tejo.org/*).
EA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
NESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mirejo.mireille@gmail.com*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

lembreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR re. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la ndaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas embrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la ternacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, vedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.
a pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de mo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj ndoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn or svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona aj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. ekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
LEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
ejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

espondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*.
resado: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
edaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*. Rete: <*jozefo.nemeth@gmail.com*>, *ttp://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050*. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.
formas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*r.moerbeek@wanadoo.nl*>.

...OJ

...Vasil Pistoli,
...Selimi, Rr. Maliq
...50, ap. 3, AL-Tirana,
...*el@yahoo.com*
... Penny Vos,
...St, Candelo NSW, 2550
...*os@yahoo.com*
...ona Kocięba,
...nnesln 54, BE-2650
...*na.kocieba@telenet.be*
...rançois Hounsounou,
...Lokossa-Mono,
...*yahoo.fr*
...*akas*
...*@ileibr.org*
...gela Tellier,
...ardens, Felixstowe,
...1 2HW (GB)
...*erantoeducation.co.uk*
...a Melichárková,
...Katíškovice 938,
...*a@quick.cz*
...ne Casper-Mortensen,
...en 70, 4. tv.
...benhavn,
...*@dbmail.dk*
...**:** Carola Antskog,
...n 89,
...mito
...*olumbus.fi*
...Michel Dechy,
...a Crémaillère,
...illeneuve d'Ascq,
...*y@hotmail.com*
...**:** Zsófia Kórody,
...ubenhagenstr. 6,
...erzberg/Harz,
...*y@esperanto.de*
...**:** József Németh,
...HU-8531 Ihász,
...*h@gmail.com*
...mzeh Šafii,
...7765-184,

...*eranto.org*
...gia Oberrauch Madella,
...ni 8,
...rma,
...*liceposta.it*
...sikawa Tieko,

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *pmarti10@xtec.cat*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iesperanto@versatel.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Morenefaret 8A, NO-4340 Bryne, *akbondhus@jkn.no*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, *agi.emanuelsson@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, *mirejo.mireille@gmail.com*

Togolando: Attiogbe-Agbema-don B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lomé, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti 32-108, UA-43026 Luck-26, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj Kanado: Doroteo

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off Main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*


Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*



Klarigoj:

0 - verbo (nukleo) (-as, -os, -is, -us, -u)
1 - subjektoj (kaŭzantoj, ne-kaŭzantoj)
2 - rektaj objektoj (**n** finaĵo)
3 - finaĵoj: a, e, i, (n)*
4 - prepozicoj
5 - semantikaj lingvo-tavoloj (signifo-spacoj) kaj demandoj al ili.

Atento: la senco de la elektita verbo (implicas) indikas uzeblajn finaĵojn, prepoziciojn por konkretaj signifo-spacoj.

* (n) - finaĵo uzebla por anstantaŭi (ekvivalenti) prepozicion

Semantika parolgenerilo por lingvoj - mediatoro por kreaj ekzercoj en Esperanto - modelo de Irena Szanser